

29. 4. 1933.

Pri la sola cigana lernejo.

Sinjinorinoj kaj sinjoroj, hodiaŭ mi parolos pri unika lernejo, la cigana lernejo en Uŝhorod.

Vi ĉiuj konas la strangan migrantan ciganan popolon, kies anojn oni renkontas en la tuta Eŭropo, ja eĉ en partoj de Azio, Afriko kaj Ameriko. La deveno de la cigana popolo estis longe enigma. Laŭ ilia propra aserto kaj opinio tradiciita de l'patro al filo, ilia prapatrujo estis Egiptujo. Tio estas la kaŭzo, kial ili ricevis en multaj lingvoj nomon, montrantan ilian egiptan devenon. En multaj eŭropaj ŝtatoj, nome en Germanujo, Francujo, Svisujo kaj Italujo, ili aperis preskaŭ samtempe - en la komenco de la dekkvina jarcento.

Nur multe pli poste, kiam la lingvoscienco estis pli evoluiĝinta, montris ilia lingvo la vojon, kiu kondukis al ilia vera patrujo. Kaj granda nombro da vortoj, kiujn ili alprenis de diversaj popoloj, montris klare la landojn, kie ili plej longe haltis kaj ripozis sur sia mirinda, centjara migrado. Ilia lingvo estas hinda, kiel montris en la dekoka jarcento Rüdiger kaj Grellmann kaj pli poste la fama Miklosich. Ilia patrujo estas la Hindokus-lando. De tie pelis ilin ilia maltrankvila sango okcidenten, tien kie la suno subiras; tra Persujo, Kurdistano, Armenio, Malgranda Azio al Grekujo. Tie ĉi ili longe restadis, kiel pruvas la multnombraj grekaj vortoj enpenetrantaj en ilian lingvon. El Grekujo ili migris al Rumanujo, Hungarujo, la bohema reĝolando kaj fine en la ceterajn ŝtatojn de Eŭropo.

Estas interese, ke la ciganoj en la mezepoko estis akceptataj tre gastame de la popoloj, tra kies landoj ili migris. La bohema reĝo Zigismundo, kiu estis samtempe germana imperiestro, protektis ilin eĉ per specialaj favorleteroj. Sed baldaŭ ili montriĝis kiel lertegaj ŝtelistoj kaj trompistoj kaj la iama gastamo ŝanĝiĝis en malŝato, malamo kaj fine en kruela persekuto.

Pri la ecoj de ilia karaktero oni povas diri nur malmulton favoran. La ideoj de l' devo kaj persista laboro estas fremdaj al ili. Kvankam ili estas lertegaj kaldronistoj, tamen ilia laboro similas pli al ludo. Plej multe ili ŝatas la negocon kun ĉevaloj, ilian aĉetadon, vendadon, sed precipe ŝanĝadon, ĉar ĉi tie ili povas utiligi sian ruzegan tromparton. Laŭ la religio ili estas kristanoj, kiuj ne ŝanceliĝas baptigi siajn infanojn kelkfoje, por akiri la kutiman baptonacon. Kredemajn vilaĝaninojn trompas la ciganinoj antaŭdirante al ili la estontecon.

Ilian nombron oni taksas je du milionoj. Relative multaj ciganoj vivas en Rumanujo kaj Hungarujo.

Multaj influriĉaj viroj, ja eĉ regnestroj, provis gajni la eternajn migrulojn por la civilizacio, sed vane. Plej konataj estas la tiudirektaj klopodoj de la aŭstra imperiestro Jozefo la dua. Kio ne sukcesis al potenculoj, tio sukcesis al simpla slovaka instruisto. Ĝis nun la ciganoj timeme evitis la lernejon, kvankam la ĉeĥoslovaka leĝo pri deviga vizito de lernejo validas ankaŭ por ili.

Antaŭ dek jaroj proponis slovaka instruisto fondi ciganan lernejon en la urbo Uŝhorod, la ĉefurbo de Subkarpata Rusujo. La ciganoj ricevis novan, modernan lernejon kun lavejo por la infanoj kaj apuda herbejo, uzata kiel dumsomera ludejo kaj gimnastikejo.

Kia estos la sorto de tiu ĉi lernejo? Jen la demando de ĝia unua instruisto, kies forta kredo estas: "La cigano estas ankaŭ homo." Kaj ni tuj aldonu, ke ĝi fariĝis la sola kultura ejo por la ciganoj, sola sur la tuta mondo, kies famo rapide disvastigis inter la ciganoj sur la tuta kontinento. Cigano en Polujo scias egale bone pri sia lernejo, kiel lia samgentano migranta ie en suda Francujo. Uŝhorod fariĝis la spirita ĉefurbo de tiuj ĉi senhejmaj filoj de l'naturu. Sed ĝia famo disvastiĝis ankaŭ inter la pedagogiaj fakuloj. La modesta dometo gastigis jam centojn da bonfamaj pedagogoj kaj gazetistoj venintaj el ĉiuj partoj de la tero, Aŭstralion ne esceptante. Ili ĉiuj venis por vidi kaj studi, kio ŝajnis ĝis nun neblaĵo. La instrua lingvo estas la slovaka. Ĉiun vizitanton surprizas la fervoreco kaj diligenteco de la lernantoj. La vizito estas tre regula - naŭdek-kvin procentoj -, estiminda cifero kaj certe multaj aŭskultantaj instruistoj envios sian kolegon. Eĉ la plej malgrandaj lernantoj sekvas tre atente ĉiun vorton de sia granda kamarado, kiun ili senfine estimas kaj amas. Amo por amo.

Malaperis la tipaj ecoj de ciganaj infanoj: la malpuremo, ŝtelemo, mensogemo kaj altrudiĝemo. La infanoj estas afablaj kaj intence forgesitaj objektoj aŭ mono sur la tablo de la

instruisto, restas ne tuŝitaj ĝis la sekvonta tago. La bona influo de la lernejo etendiĝas eĉ al la gepatroj kaj la ĝenerala vero, ke la infanoj estas la edukistoj de siaj gepatroj, validas ĉi tie en plej alta grado. La gepatroj fieras pri siaj la lernejon vizitantaj infanoj kaj klopodas honeste agi en sia ĉiutaga vivo. Ofte ili vizitas la instruiston kaj informiĝas pri la konduto de siaj infanoj.

La infanoj rimarkinde lerte kalkulas kaj tre interesiĝas pri la fundamentaj rajtoj kaj devoj de l'civitano. La knabinoj plej ŝatas la manlaborojn, la knaboj desegnadon, sed precipe la muzikon. Ili belege kantas. Krom tio ili devige lernas ludi sur la violono, ses horojn ĉiusemajne.

La laboro de la instruisto ne estas limigita nur al la infanoj vizitantaj la lernejon. Li studis kun la junularo kaj plenaĝuloj tri teatraĵetojn, kiuj multe plaĉis al la loĝantaro de Uĝhorod. Konsiderante, ke ĉiuj aktoroj estis analfabetoj, la cigana vespero estis eksterordinara sukceso. Pli poste ili entreprenos vojaĝon en okcidentajn ŝtatojn, de kie ili ricevis multnombrajn invitojn. La junularo ludas ankaŭ piedpilkon, kaj per sia vere sporta konduto ili povus esti modelo al multaj kluboj de civilizitaj popoloj.

Vekiĝantaj ciganoj. Antaŭ malmultaj jaroj neniu kredus tian eblecon. . . Jes, la ciganoj de Uĝhorod certe ne estas la tuta cigana popolo, sed la eksperimento rompita por ĉiam la ĝisnunan antaŭjuĝon pri la malpli-valoreco de l' ciganoj. La eksperimento klare montris la egalecon de ĉiuj homoj kaj tiu ĉi pruvo estas ĝia plej ĝojiga rezulto— rezulto atingita per sincera amo kaj pacienca, senlaca laboro de la slovaka instruisto Ladislav Hegediš.

Amikoj, mi atentigas vin je nia esperanta vespero la kvinan de Majo, tempo: dudekdu – dekkvin minutoj – kvinan de Majo, dudekdu – dekkvin minutoj, Mezeŭropa Tempo.

Th. Kilian